

2a ORDINARA DIMANĈO – 17-an de Januaro 2016

JESUO FARIS SIAN UNUAN MIRAKLON EN KANA DE GALILEO -
Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 2, 1-11

La trian tagon okazis nupto en Kana, urbo de Galileo, kaj ĉeestis la patrino de Jesuo. Ankaŭ Jesuo kaj liaj disĉiploj estis invititaj al la festeno.

Sed kiam mankis la vino, tiam la patrino de Jesuo diris al Li: "Ili ne plu havas vinon".

Jesuo respondis: "Ino, kio estas inter vi kaj Mi? Mia horo ankoraŭ ne venis".

La patrino diris al la servantoj: "Ĉion ajn Li diros al vi, tion faru".

Estis tie ses ŝtonaj akvo-kuvoj, destinitaj por la purigado de la Judoj, entenantaj po cent litrojn. Jesuo diris al ili: "Plenigu la kuvojn per akvo".

Kaj ili plenigis tiujn ĝis la rando. Poste Li diris al ili: "Nu, ĉerpu el ili, kaj portu al la festenestro".

Kaj ili alportis.

La festenestro gustumis la akvon nun fariĝintan vino. Sed li ne sciis, de kie ĝi venis. Sciis tion nur la servantoj, kiuj ĉerpis la akvon. Ĝin gustuminte, la festenestro alvokis la fianĉon kaj diris al li: "Ĉiuj prezentas unue la bonan vinon; kaj post kiam oni jam drinkis, la malpli bonan; sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun!".

Ĉi tiun komencon de signoj faris Jesuo en Kana de Galileo, montrante sian gloron, kaj Liaj disĉiploj kredis al Li.

La evangelioj ne estis verkitaj por esti legataj. Kial? Ĉar la plimulto de la personoj estis analfabeta. La evangelioj estas verkoj beletraj, teologiaj, spiritaj, ege komplikitaj, densaj, signifoplenaj, kaj ili estis sendataj al komunumoj, kie la leganto estis legisto, nome la komunuma teologo: li ne simple legis, li interpretis.

Kaj tiucele li atentis la spurojn, kiujn la verkinto, la evangeliisto, enmetis en la tekston. La samon klopodas fari ni, por ke de la hodiaŭa teksto elfloru tio, kion la evangeliisto intencis diri. Ni atentu tuj la unuan spuron. *"La trian tagon okazis nupto" ... en Kana, urbo de Galileo*". Al tiutempa judo la tria tago memorigis senpere la tagon de la interligo, en kiu Dio sur monto Sinajo donacis al Moseo la interligon kun sia popolo.

Do Johano atentigas: ĉi tiu tuta rakonto estas bildo de la interligo kun Dio. Kaj la nupto! La interligon inter Dio kaj la profetoj bildigis nupto: Dio estis la edzo; la popolo, Izraelo, la edzino.

"... kaj ĉeestis la patrino de Jesuo. En ĉi tiu teksto ĉiuj rolantoj estas sennomaj. Tion ni rimarkigis ankaŭ en alia dimanĉo (Lk 2, 41-52): rolanto sennoma estas reprezenta. Ĉi tie aperas kun sia nomo nur Jesuo.

"Ankaŭ Jesuo kaj liaj disĉiploj estis invititaj al la festeno. Sed kiam mankis la vino,..." en la geedziĝa rito la ĉefa momento estas, kiam la edzo kaj la edzino trinkas el unu sola vinkaliko, kiu simbolas la amon. Sed ĉi-foje mankas ĝuste la ĉefaĵo, mankas la vino.

"... tiam la patrino de Jesuo diris al Li: "Ili ne plu havas vinon". Atentu: la patrino de Jesuo, invivita al la festeno, ne diras, kiel ni supozus "Ni ne havas vinon", sed "ili ne havas vinon". La patrino reprezentas la Izraelon fidelan, ĉe kiu daŭre restis la amo al Dio. La respondo de Jesuo ŝajnas stranga, eĉ malafabla, sen la respekto de filo al patrino.

"Jesuo respondis: "Ino, ...". Ankaŭ nun, ni klopodu kompreni, kion intencas esprimi Johano. "Ino" signifas "edzino". Tri inojn en ĉi tiu evangelio Jesuo alparolas tiel. Ili estas la bildoj de la edzinoj de Dio.

Kiel ni diris antaŭe, la patrino de Jesuo simbolas la edzinon fidelan de la Malnova Testamento; la alia persono, kiun Jesuo alparolos tiel, estas la samarianino (Joh. 4,21), kiu simbolas la Izraelon adultan, kiun la edzo regajnas por si per eĉ pli granda am-ofero. Kaj la lasta persono, kiun Jesuo

alparolos same, estos Maria Magdalena (Joh. 20,15), simbolo de la edzino de la nova interligo.

Nun Jesuo vidas en sia patrinoi denove la econ de la fidela edzino. kaj daŭrigas..., *kio estas inter vi kaj Mi?...*" do "Kial tio koncernas nin?" "...*Mia horo ankoraŭ ne venis*".

La patrino de Jesuo kredas, ke la mesio alportos novan vivon al la antikvaj institucioj. Jesuo tute ne intencas tion, la nova vivo estos por institucio nova, kion ni konstatos baldaŭ.

Ni vidu ŝian reagon: " *La patrino diris al la servantoj:*" servantoj, ne servistoj: ili servis libervole; estas uzita la vorto "diakono", kiu poste iĝis liturgia. "*Ĉion ajn Li diros al vi, tion faru*". Do en Jesuo ŝi vidas la novan leĝdonanton, la novan aŭskultendan Moseon, kaj ŝi uzas la samajn vortojn, per kiuj la Izraela popolo respondis al Moseo, akceptante la interligon (El 24,7).

Finiĝis la dialogo, la atento turnigas al la ejo. "*Estis tie ses ŝtonaj akvo-kuvoj*, ne terakotaj amforoj, kiajn oni vidas en kelkaj pentraĵoj, ujoj removeblaj, ŝtonaj kiel la leĝtabuloj), *destinitaj al la rita purigado de la judoj*". Do en tiu familia ejo troviĝis sescent litroj da puriga akvo. entenantaj po cent litrojn. "Jesuo diris al ili: "Plenigu la kuvojn per akvo". Kaj ili plenigis tiujn ĝis la rando. *Poste Li diris al ili: "Nu, ĉerpu el ili, kaj portu al la festenestro*. Tiaj festenoj daŭris longe, eĉ unu semajnon, kaj oni dungis iun, kiu prizorgu la tutan aferon, ke ne manku mangaĵoj kaj precipe la vino Tiu dungito pri tio ne zorgis. Li simbolas tiujn religiajn estrojn, kiuj tute ne atentis, ĉu la popolo sentas amrilaton kun Dio. "*Kaj ili alportis*".

Nun ni komprenas la kialon de la ne sufiĉa vino. Religio emfazanta la senton de kulpo, de neindeco, de bezono de pardono, de nepureco postulanta puriĝon, estas religio kiu ne rimarkas nek akceptas la amon de Dio. La sento de malpureco ne tralastas amon.

"... *Kaj ili alportis. La festenestro gustumis la akvon nun fariĝintan vino*". La kuvoj ne entenas la vinon de Jesuo, sed la akvo iĝas vino kiam ĝi estas verŝata el la kuvoj. "*Sed li ne sciis, de kie ĝi venas. Sciis tion nur la servantoj, kiuj ĉerpis la akvon*". "*Ĝin gustuminte, la festenestro alvokis la fianĉon kaj diris al li: "Ĉiuj prezentas unue la bonan vinon; kaj post kiam oni jam drinkis, la malpli bonan..."* Certe tiu estis la kutimo en longedaŭra festeno; "... *sed vi rezervis la bonan vinon ĝis nun*".

Ni komprenu do, kio okazis, kaj kion signifas tiu ŝanĝo. Ĝi estas la nova interligo proponata de Jesuo. La fundamento de la rilato kun Dio ne plu estas la oboe al la leĝo (kiu nin sentigas ĉiam neindaj kaj nepuraj), sed la akcepto de Lia amo. Kun Jesuo la amo ne plu estas repago de la meritoj, kaj do rezervita al tiuj kiuj ĝin meritas, sed kontentigo de la bezonoj, do por ĉiuj.

La religiaj estroj ne komprenas, ke la belo kaj bono estas ankoraŭ venonta. Sed Johano tion tuj anoncas, kvazaŭ por diri "Atentu bone, ĉi tiu ne estas anekdoto, sed io multe pli profunda.". Kaj fakte la konkludo estas: "*Ĉi tiun komencon de signoj faris Jesuo en Kana de Galileo, montrante sian gloron*"., Ĉi tiu estas la sola punkto, en kiu Johano uzas la vorton "gloro"; li tion ne faras je la revivigo de Lazaro, mortinta de kvar tagoj (Joh 11, 28-45) "*... kaj Liaj disĉiploj kredis al Li*". Kaj la mesaĝo ne koncernas sensoifigon de gastoj jam ebrietaj, sed la ŝanĝon de la interligo. Ne necesas puriĝo por akcepti la amon de Dio, sed estas la amo de Dio tio, kio purigas la homon.